

Ormuzdo kaj Arimano

politika satiro

de

Carl Jonas Love
Almqvist

tradukita de

Gunnar Gällmo

La svedlingva originalo de ĉi tiu teksto aperis en 1839, kaj ĝia aŭtoro mortis en 1866.

Esperanta traduko © Gunnar Gällmo 2007

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe <http://www.lulu.com>

Enhavo

La verkisto kaj la verko — antaŭparolo de la tradukinto 5

Ormuzdo kaj Arimano 11

Reglamento pri la landdistribuo 43

Vojiradreglamento 52

Proklamo pri regantinstalado 53

*"Ormuzdo staris dum momento silenta, kun la
buŝo pro miro duone malfermita. Mi, li diris
finfine, mi estas la bono mem en la mondo. Mi **ja**
gvidos teron kaj homaron al la bono; ili sekvos
min kaj estos beataj, kiom ajn ili pro tio
suferos."*

La verkisto kaj la verko — antaŭparolo de la tradukinto

Carl Jonas Love Almqvist estis unu el la plej gravaj svedaj verkistoj de la 19-a jarcento, filozofia kaj politika pensanto kiu laŭ mia opinio devus esti interesa ankaŭ por alilandanoj. Li estis komplika persono — romantikisto kaj realisto, burokrato kaj poeto, moralfilozofo kaj almenaŭ foje piulo, sed tute ne sanktulo.

Li naskiĝis la 28-an de novembro 1793, studis ĉe la universitato de Upsalo kaj laboris kiel oficisto en Stokholmo. Dum la jaroj 1824-1825 li provis, laŭ kelkaj tiutempaj romantikismaj ideoj, vivteni sin kiel kamparano en la provinco Vermlando. Kompreneble li trovis ke, kvankam kamparanoj ne ĝuis grandan respekton, tamen ilia profesio postulas certajn kvalifikaĵojn kiujn li tute ne havis. Li do denove translokiĝis al Stokholmo, kiel li en 1828 iĝis instruisto ĉe la lernejo Nya elementarskolan; dum la jaroj 1829-1841 li estis ĝia lernejestro. En 1837 li pastrigis en la tiama ŝtata — kaj monopola — luterana eklezio, kvankam lia religia konvinko ne tute, aŭ eĉ tute ne, koincidis kun ĝiaj dogmoj. Kiel ĵurnalisto li kunlaboris en du el la tiutempe plej radikalaj svedaj taggazetoj — Aftonbladet kaj Jönköpingsbladet.

Pro ekonomiaj problemoj li konfliktis kun la

uzuristo von Scheven, kaj eble provis murdi lin per arseniko. Lia kulpo tamen neniam estis jure pruvita (kaj multaj el liaj admirantoj ĝis hodiaŭ kredas ke li estis senkulpa, tamen ne ĉiuj), ĉar en 1851 li tre rapide forlasis la landon kaj elmigris al Usono.

Se lia kulpo al murdoprovo ne estas tuttute certa, tiu al bigamio ja estas, ĉar li postlasis edzinon en Svedio kaj, sen divorci ŝin, denove edziĝis en Usono, kio estis kontraŭleĝe en ambaŭ landoj.

Al Svedio li neniam kuraĝis reveni, riskante tie mortopunon pro murdoprovo. Li tamen revenis al Eŭropo post 14 jaroj en Ameriko, petis sed ne ricevis garantion pri sia sekureco en Svedio, kaj mortis pro naturaj kialoj en Bremeno, Germanio, la 26-an de septembro 1866, apenaŭ 73-jara.

Kiel verkisto li estis komence romantikisto kaj poste realisto. En esperanto aperis en 1998, ĉe la eldonejo Al-fab-et-o, lia realisma romaneto *Tio konvenas* ("Det går an"), en traduko de Sten Johansson. Ĝia svedlingva originalo aperis en 1839, hazarde la saman jaron kiel la originalo de *Ormuzdo kaj Arimano* ("Ormus och Ariman"), sed oni kredas ke tiu estis verkita jam pli frue, pro la malsameco inter la stiloj de la du verkoj.

La ĉefa beletraĵo de Almqvist estas la granda ciklo *Törnrosens bok* ("Libro de sovaĝa

rozo"), kiu aperis en du serioj 1833-1851 (do ĝis lia fuĝo al Usono). Ĝi konsistas en kadra rakonto, kies ĉefaj personoj — Hugo Löwenstjerna kaj Richard Furumo — estas ankaŭ tiuj de *Ormuzdo kaj Arimano*, kaj granda nombro da enŝovitaj romanoj, noveloj, poemoj, teatraĵoj, eseoj, traktaĵoj kaj eĉ muzikaĵoj; Almqvist komponis ne nur la melodiojn al sia propra poemciklo *Songes* ("Songĝoj"; la titolo estas franca, sed la poemoj svedlingvaj), sed ankaŭ kelkajn porinstrumentajn muzikpecojn, nomitajn *Fria fantasier för pianoforte* ("Liberaj fantazioj por fortepiano"), 1847-1848.

Almqvist verkis ankaŭ faklibrojn pri lingvistiko kaj matematiko, ekzemple svedajn gramatikon kaj ortografion (la literumado de la sveda lingvo unuafoje normiĝis maljam dum lia vivtempo).

Kiel politika pensanto, Almqvist estus unu el la plej maldekstremaj svedaj verkistoj de tiu tempo. Kelkaj el liaj pensoj estis tre radikalaj por liaj samtempuloj, poste estis akceptataj sed nun ŝajnas denove eksmodiĝi, ekzemple tiu ke krimulo estas esence malsanulo, ne puninda sed kuracinda (tiel en lia eseo de 1821 *Om brottsliges behandling*, "Pri la traktado de krimuloj").

Lia verko de 1850 *Europeiska missnöjets grunder* ("La bazoj de la eŭropa malkontento")

enhavas ĉapitron titolitan *Skillnaden mellan folk och pöbel* ("La diferenco inter popolo kaj plebo"), kie li difinas tiun distingajon ne per socia pozicio aŭ bonhavo, sed per la volo aŭ nevolo progresi:

"Ĉiuj, kiuj loĝas en iu lando, estas ĝia loĝantaro; sed kiam oni el la tuta loĝantaro subtrahas la *plebon*, tiam restas tio, kiu estas la *popolo*." ... "Nu bone. Ni havas du specojn de plebo, unu maskitan kaj unu sinceran."

Al la maskita plebo "apartenas tiuj, kiuj opinias sin *moŝtaj*, nomas sin *kleraj*, kredas sin *edukitaj*, prezentas sin kiel *liberanimaj*, sen esti tiaj" - do ne la "ĉifonproletaro" poste malestimata eĉ de Marx, sed kelkaj el la altranguloj de nia socio, inkluzive tiajn kiuj laŭte laŭdadas progresemajn ideojn sen mem praktiki ilin.

Tiun penson oni povas trovi jam en *Ormuzdo kaj Arimano*, kie Ormuzdo — laŭ zoroastrisma doktrino absolute bona — estas fakte la ĉefa estro de tiu "maskita plebaro", kiu imagas sin bona sen vere kompreni, kaj sen voli kompreni, kio estas bono.

Almqvist estis granda poeto, sed sendube ankaŭ tute kapabla burokrato; almenaŭ evidentas ke li bonege majstris la tiutempan burokratan manieron trakti la svedan lingvon, la tiel nomatan "kancelarisvedan" (*kanslisvenska*),

kiun li malice parodias en ĉi tiu libro, kiam li priskribas la konflikton inter la granda kosma praburokrato (kaj prakontrolemulo) Ormuzdo, kaj la same granda kosma prapoeto (kaj praanarkiemulo) Arimano. (Se vi trovas partojn de la esperantlingva teksto malfacile komprenebla, mi ne povas pardonpeti; por nuntempa svedlingvulo ankaŭ la originalo estas malfacila.)

Interesa koincido — se estas koincido — estas la fakto ke Ormuzdo, laŭ Almqvist, rezidas en blanka domo...

Kaj ke tiu rezidejo situas sur la luno, por ke Ormuzdo havu fiksan punkton ekster la tero kaj tiel povu movi "se ne la tutan teron, tamen multon sur ĝi" — ideo sufiĉe simila al la politika bazo de la sovetia kaj usona spacprogramoj dum la malvarma milito, pli ol cent jarojn post la apero de ĉi tiu verko.

En 1839, do ekzakte 130 jarojn antaŭ la unua vizito de homoj al la luno, laŭ iniciato de alia "bonulo" en blanka domo — John F. Kennedy.

Kaj ĉu la "Vojiradreglamento" ne iomete paralelas al kelkaj dekretoj nun aperantaj el Bruselo?

Gunnar Gällmo

Ormuzdo kaj Arimano

"Ĉu do viaj amrakontoj ne finiĝas sufiĉe malgaje, mia bona Rikardo? Kaj mi scias," daŭrigis sinjoro Hugo, "ke la amo en si mem estas sufiĉe stranga, neniu do miru ke ĝi estas tia kia ĝi estas. Ĉiam post la morto de mia kara edzino mi vidis lin nur defore, tute respektas lin kaj volonte aŭdas pri li; sed por distri min mem mi elektis al mi moralon kaj geografion, historion kaj lingvistikon, kiel pli trankvilaj — kaj precipe la interesan politikon..."

"La politikon?" lin interrompis Rikardo.

"Jes ja, ĝuste la politikon. Mi diru al vi kiaj estas ni homoj: al ni ĥinfine restas nenio krom la politiko. Ĉar ni vivas en tri grandaj rilatoj: 1. en tiu al Dio, kiu formas la tutan senfinan sferon de esploroj, doktrinoj, vivo kaj cirkonstancoj, kiun ni unuvorte nomas Religio, kaj kiu troveblas en la institucio *Eklezio*; 2. en tiu inter la Seksoj, kiu formas la *Familian Vivon*, la institucion plej antikvan surtere, kiu ĉie per la kunigo de viro kaj virino formas nekalkuleblajn sferetojn, el kiuj poste konsistas ĉiuj aliaj homaj strukturoj en la mondo; 3. en tiu inter Popolo kaj Estraro, kiu formas la *Ŝtaton*, grandan unuon, kiu rilate al amplekso kaj pezo staras meze inter la Eklezio kaj la Familia Vivo, ligante la homojn al socioj, kaj defendante tiujn unuj kontraŭ la aliaj.

Nun mi volas nur diri, ke koncerne la unuan el tiuj tri, mi ne estas teologo, kaj ĉiuj viaj rakontoj, Rikardo, ekde la Di-malamanto ĝis Ferrando Bruno, donis al mi malmulte da espero sukcese solvi tiujn aferojn. Koncerne la duan, kiun oni kutimas nomi ankaŭ la Romantika amrilato, kaj al kiu mi sentas la plej puran, plej sinceran respekton, sed pri kiu mi, kiel mi jam diris, propraparte ekde la morto de mia en paco forpasinta edzino malpli okupiĝas, mi devas same aldoni ke viaj rakontoj, Rikardo, ekde la Lun-kanto, kie Ramulfo trovas sin ŝirita inter iu Guanda kaj iu Malfred, aŭ — por paroli pri aliaj — la Luno sentas sin malfeliĉa inter la Suno kaj la Tero, kaj cetere ankaŭ la Lupino, la Ursino kaj la tutan vojon ĝis la profunde funebranta Leonardo, montras tre malesperigajn perspektivojn pri tiu tuta afero, parte ĉar la personoj mem ofte ŝajnas apenaŭ scii kion ili deziras, kaj parte ĉar milionoj da milspecaj obstakloj ekestas. Preterpasante do, miaparte, kaj la Eklezion kaj la Amon, mi aliĝas, kiel mi ankaŭ antaŭe diris, kun la plej granda plezuro al la situacio en la socio, al la Politiko; ĉar, vi diru kion vi volas, la Ŝtato tamen estas io. La sola malagrabla afero, kiu ĉe tio aperis, estas la fakto ke oni komencas ne scii kiel oni pritraktu la ĉefajn bazojn mem de la Estraro."

Nu, tio tamen estas sensignifaĵo en la

politiko, mi pensas?

"Ne io sensignifa, amiko mia. La afero dependas de nenio malpli grava ol la scio, sur kio ĉiu potenco estu bazita: ĉu sur la Homoj mem, kiuj, por progresi spirite kaj korpe, inter si starigu estraron, devigitan konduki ilin al kio ŝajnas plej bona kaj utila; ĉu sur la Regantaj Familioj kaj iliaj membroj, kiuj do origine ricevis sian potencon de pli alta estaĵo, kaj tial estu obeataj."

Se ne estas pli da aferoj kiuj maltrankviligas la politikan sciencon, tiam oni certe devas rigardi ĝin sufiĉe trankvila, stabila, io al kiu oni povas kun plezuro kaj sen zorgoj engaĝi sin, trovinte, kiel vi, sinjoro Hugo, degnas diri, la malfacilaĵojn en religio kaj amo tro grandaj, por je pli matura aĝo okupi sin pri ili.

"Estas tiel. Min amuzas la politiko, same kiel la geografio kaj la lingvistiko, sed nia tempo mem donas al mi la plej bonan ateston ke oni, kiam temas pri sociaj aferoj, ne samopinias pri la bazoj. Tamen — malgraŭ ĉio — se ankaŭ la politiko ne pravigus sin, tiam ankaŭ la tria kaj lasta rilato estus malligita, kaj eĉ ne maljunaj prudentuloj trovus konsolon..."

Mi, interrompis Rikardo, estas tiel feliĉa ke mi povas nuligi ĉiun maltrankvilon en la politiko per perfekte senpartia dokumento.

"Kion, amiko mia? Vi povus diri sur kio ĉiu

potenzo estas bazita? Dokumento, vi diras?"

Ne nur por la politiko, sinjoro Hugo, sed ankaŭ por la historio kaj geografio mi havas trankviligan ilon.

"Kaj vi ekzemple en la Historio povus diri al mi, kiel mi faru kiam en la antikveco iu aŭ alia kontraŭdiro trafas min? Kaj en la Geografio ekzemple la plej interesa el ĉiu geografia — la azia..."

Do Azion vi, sinjoro, plej volonte ekkonus?

"Plej volonte mi ekkonus la tutan mondon, sed inter unuopaj geografiaj objektoj sendube Azio estas unu el la plej..."

Ĉu mi do rajtas mencii Ormuzdon kaj Arimanon?

"Kio?"

Estas morala, geografia kaj politika rakonto.

"Bonege! Perfekte por mi! Jen mi sidas, Rikardo. Mi aŭskultas kaj nur aŭskultas."

Rikardo do komencis:

Ormuzdo kaj Arimano

La tikla kaj komplika problemo, kiam oni esploras antikvajn kronikojn, konsistas en tio ke, rigardinte kelkajn el ili, kaj tiel konstruinte al si sistemon, opinion, kiu ĉiurilate estas konfirmata; sed poste plirigardante ankoraŭ pliajn kronikojn; tiam oni trovas tute sufiĉan kialon renversi tiun

sistemon, kiun oni konstruis surbaze de la antaŭaj. Se oni finfine estos trarigardinta ĉiujn kronikojn, tiam oni troviĝos en kontraŭdiraro kiu similas al nescio tiel, ke oni pri la afero mem scias nenion, sed malsimilas al ĝi tiurilate, ke oni kredas ion scii. La sola saĝa rimedo por solvi tion estas krei, per ideo aŭ kondiĉo, kiun oni elpensas, kritiksistemon, per kiu oni havigas al si kialojn malakcepti grandan parton de la kronikoj, por ke la restantaj ne estu tro multaj, sed povas iamaniere esti kombinitaj kaj unuigataj. Plej bonŝanca oni tamen estas, se oni pri iu temo povas trovi unu solan kronikon tiel nerifuteble altkvalitan, ke ĝi liveras ĉiun kritikon, kaj samtempe tia, ke ĝi enhavas ĉiujn informojn bezonatajn. La malnova geografio estas temo ne malpli pene klarigebla ol iu alia. Pri tutaj landoj, menciitaj en kronikoj, oni ne scias kie ili situis. Aliajn oni trovas, pro nomsimileco aŭ naturpriskribo, serĉindaj en suda Arabio, aŭ proksime; sed poste evidentas, pro aliaj informoj, ke ili verŝajne situis en la Urala regiono, aŭ en Japanio. Tiaj okazintaĵoj lacigas la esploranton, por ne menci la leganton. Tial ni taksas nin sufiĉe bonŝancaj, ĉar ni trovis pratempan dokumenton pri la antikva geografio, precipe pri la interna, malplej konata parto de Azio. Ĝi havas tian aŭtoritaton, ke neniu alia povas montri pli grandan. Samtempe

ĝi estas tiom detala, ke ĝi estas por ni tute sufiĉa pri ĉi tiu afero.

Sed nek unu nek la alian ni povas prezenti, sen permesi al ni deflankiĝon por prilumi la naturon de la dokumento. La doktrino pri *la bona kaj malbona principoj*, ĝenerale trovebla en Persio, estas sufiĉe bone konata de la kleruloj; sed ĉar ni parolas ne nur al la plisciantoj, sed ankaŭ al la malpli progresintaj, ni devas pri tiu afero menciĝi ĉi tion:

La antikvuloj vidis, ke en la universo troveblas kaj bono kaj malbono, kaj oni ĝis hodiaŭ same pensas. Nun restas la problemo pri ilia origino.

La origino de ĉiu bono, trovebla en la mondo, oni facile agnoskas. Tio venas el... la bono. Ĝi devenas, alivorte, el tio, kiu estas bona en si mem; kio signifas, ke la bono estas sia propra *bazo*, estas baza estaĵo (principo) en si mem.

Sed la Malbono? Oni opiniis en Persio, ke ĝi ne povas havi sian originon en la bono; ĉar la laste menciita ne povus esti ĝuste nomata bono, se ĝi naskis malbonon. Nek oni trovis eblaĵo ke la malbono mem origine estis bono, kaj poste iamaniere iĝis malbono; ĉar oni konsideris ke iu afero devas *jam iamaniere esti* malbona por *povi iamaniere iĝi* malbona. Oni tial opiniis, ke la malbono ne povis origine esti alia ol malbono,

ke ĝi ekestis spontanee; alivorte, ke ĝi estas sia propra bazo — estas baza estaĵo (principo) en si mem.

Ankaŭ la malbona estaĵo, el kiu fluis ĉiu pli modesta, surtera malbono, do estas siaspece *plej alta* estaĵo, same kiel la bona. Ĉar se io ne originis en io alia, tiam tio ne havas ion siaspecan super si mem, sed estas siaspece la plej alta. El tio ili konkludis ke nepre ekzistas *du plej altaj estaĵoj*. Tiuj certe neniam estis kunigitaj, neniam samspecaj; sed tamen ili povis en la tempokomenco sufiĉe bone interkonsenti, kaj do la malbona estaĵo tiam ne plagis la mondon, kvankam ĝi jes ja ekzistis. sed poste la du malamikiĝis, kio kaŭzis ĉion malican kaj malfacilan. Estontece ili tamen denove interpaciĝos, post ĉirkaŭ 12 000 jaroj.

Kiuj amas nomojn, tiuj nomas tiun pensmanieron *dualismo*. Ĉe la Persoj la bona pra-estaĵo nomiĝis *Ormuzdo*, sed la alia nomiĝis *Arimano*. Ni ĉi tie literumis iliajn nomojn laŭ la plej simpla maniero; sed estas uzataj ankaŭ pli komplikaj versioj. Ormuzdo do nomiĝas *Oromases*, *Hormuzd*, *Hormisdad*. La nomo de la alia, aliflanke, estas skribita ne nur kiel *Arimano*, sed *Ahrimanes*, *Ahariman*, *Achariman* k. t. p. Tamen oni tre malpravas, se oni opinias ke Ormuzdo estas tute identa kun tio, kiun ni en Svedio nomas *Dio*. Dio estas multe, multe pli ol

iam Ormuzdo. Dio ne estas, kiel Ormuzdo, pagano. Same oni ne tro haste tute identigu Arimanon kun Satano.

Kiel nu fakte statas pri Bono kaj Malbono en la mondo, pri tio ni ne kredas estas nun oportune diskuti, eĉ se eblus. Tamen ni kun plezuro kaptas ĉi tiun okazon aserti nian respekton al la Universo, kiun ni opinias esti fundamente ne kaputa, sed sendifekta. Volonte ni agnoskus, ke la Tutaĵo (Universo) konsistus el du fundamentaj kontraŭoj, se nur tiuj du estus tiaj, ke ili tamen povus esti rigardataj kiel "unu sama".* Sed bono kaj malbono devas esti ĝisfundamente neakordigeblaj, se la moraleco, ĉiu bela bonkonduo, ne ĉesos havi iun signifon. Bono kaj malbono ne povas esti fundamente unu sama, se la religio ion signifu, kiam ĝi admonas nin serĉi la unuan, sed eviti la duan. Se ili estus esence identaj, kiel ni do povus foriri de la unua, dum ni trovas la duan? Se tio ne penseblas, tiam sekvas ke ne eblas ke ambaŭ *fundamentaj kontraŭoj* de la Universo (se la Universo havas tiajn) povus aparteni al la kategorio *moral*a — povus esti "bono kaj malbono". Nome, ĉar tiuj du ne estas *unu sama*, la Universo, se ĝi konsistus el tiuj, fakte estus *kaputa*. Ni estimas Dion, kiu ne estas same alta kiel satano, sed pli; kaj kiun satano ne, estante baza estaĵo same kiel li, povus tiomgrade rigardi kiel egalulon. Ni

amas bonon, kiu eble povas foje batali kontraŭ iu malbono, sed kiu tamen estas en si mem io treege supera. Tuj ni devas tamen mencii ankaŭ, ke ekzistas speco de malpli granda bono — *bona intenco* — kies tuta ekzercado konsistas en tio, ke oni provas per sia tuta kapablo agadi kontraŭ la malico. Tre respektinde, sed ni ŝatus se ĝi estus pli sukcesa.

*Bono kaj malbono ja povus esti du kontraŭoj aliloke, sinjoro Hugo! Sed tamen ĉio ĉi tio estas sufiĉe necerte.

Ni ne volas atribui al la malnovaj Persoj iun el tiuj pensoj. Eble oni eraras, se oni kredas sin certe scii, kiel la Persoj imagis tiujn aferojn; ĉu ili opiniis ke la du bazaj estaĵoj estas iamaniere kunigeblaj ĉu ne. Estis tiel, ke la fama Zoroastro (eble pli ĝuste Zerd-ust), al kiu la heroa popolo de Persio povas danki sian internan kaj superan klerecon, ne prenis el la profundo de sia propra animo la ĝermon de la fajro kiun li predikis, ne mem elpensis la doktrinon pri la du bazaj principoj; sed pli malnovan tradicion li revivigis. Pri tio samopinias ĉiuj bonaj rakontoj el lia tempo. Sed origine, sinjoro Hugo, ankaŭ tiu tradicio mem, same kiel ĉiu alia, estis fondita ne sur homa elpenso, sur spekulativa rezonado, sur filozofio pri bono kaj malbono.

Popoldoktrinoj ne estiĝas tiel, ke iu sidas sur sia seĝo kaj elpensas ilin, kaj poste publikigas ilin; sed unue ili apogas sin sur iu fakto, sur iu okazintaĵo. En la komenco de la tempo, tuj post la kreo, vere vivis du estaĵoj: *Ormuzdo*, suface potenca spirito, kaj alia nomita *Arimano*. Kiam ni intencas rakonti kiel okazis la terura kverelo, kiu komenciĝis inter ili, tiam ni tuj informas pri la fonto kie estas rakontite kiel du bazaj estaĵoj, unu bona kaj unu malbona, unue iĝis konataj surtere, kaj kiel tiuj du principoj reciproke ekkonis unu la alian kiel malamikojn. La vespera suno brilas sur la fenestroj de la salono; la radioj refraktiĝas milde kaj bele; ili lumetas sur la muroj antaŭ ni en miriga, preskaŭ rava miksaĵo de purpulo kaj grizo. Silenta kaj ridanta estas la naturo. Malproksimege en la arbaro ŝajnas al miaj oreloj ke akvofalo muĝas.

La persa bona mondospirito *Ormuzdo* havis la plej bonajn naturdotojn. Afableco lumis el lia vizaĝo, kaj arda fervoro plani tiel, ke ĉio finiĝos bone, videblis en ĉiuj liaj movoj. La plej antikvaj Kufaaj pentraĵoj kaj moneroj, prezentantaj brustbildojn de pluraj homoj vivintaj proksime al la kreo, montras Ormuzdon kiel viron kun hela hararo, krispeta ĉirkaŭ la oreloj, sed surverte iom kalvema. Ĉar nenio estis tiel kara al li kiel la volo, ke la ĵus kreita tero iĝu ĉiurilate efika kaj estu en bona stato, tial li

cerbumis longe kaj funde, kiel li plejeble bone, laŭ la plej profunda deziro de sia spirito, kaj laŭ sia, kion ajn oni imagu, sufiĉe respektinda komprenkapablo, povus tiel prepari kaj gvidi ĉion, ke tio iĝu feliĉa kaj perfekta.

Moseo de Khorene diras, ke Ormuzdo posedis sian palacon en la Luno. Tiu spirito jam dekomence trovis la saman, kion la mekanikisto Arkimedo en Sirakuzo ekkomprenis longe poste, nome ke se oni posedus fiksan punkton *ekster* la la tero, tiam oni povus movi, se ne la tutan teron, tamen multon sur ĝi. Tial Ormuzdo lokigis sian hejmon en la Luno. Li estis certa ke la homaro emas iam iĝi pli malbona ol bona. Li certigis al si ke la tero mem, kun siaj bestoj, plantoj kaj aliaj havaĵoj, havas la saman malfeliĉan emon. Se mi povu plenumi ion daŭre grandan kaj fortan por ĝia bono, li diris al si mem; se mi jam dekomence povu levi la homojn al la bono — tiam mi nepre povu meti min ekster ili kaj ilia naturo. Li tial trovis la lunon konvena. Ĝi estis ekster la tero, do Ormuzdo, plene sendependa de tiu, povis influi ĝin kaj ĝiajn loĝantojn. Sed la luno estis samtempe la plej proksima el ĉiuj astroj — la plej komfortaj por surteraj laboroj.

Simpla, kamparana kaj bela, kvankam ne grandstila, estis lia palaco, aŭ pli ĝuste domo; ĉar tiu estaĵo ne amis la faritaĵojn kreitajn de la

fiero kaj aroganteco. Tia tamen estas la regno de la mildeco, ke ĝuste tiu malestimo al pompo, tiu emo al modesteco, disvastigis super la loĝejo de Ormuzdo brilon de vigleco kaj ĉarmo, ja preskaŭ grandeco. Bosko de aceroj, ne tiel ampleksa ke oni povus nomi ĝin palaca parko, ne tiel malgranda kiel ĉirkaŭbarita paŝtejo, ĉirkaŭis blankan domon kun flavaj ŝutroj kaj nigre farbita kuprotegmento. La meblaro celis ne tiom la belon, kiom komforton kaj oportunon. La ĉambroj en la palaco estis impone multnombraj, sed kiamaniere li uzis ilin ne estas ĉiuaspekte konate. Ormuzdo estis unu el la supernaturaj estaĵoj de la pratempo, pri kiuj parolas ĉiuj fabeloj, do lia vivmaniero ne povas esti komparata kun tiu de la homoj, kiam temas pri bezonoj. Tamen liaj ĉambroj estis multaj kaj plenaj je aranĝaĵoj. Kromdomojn li havis neniujn, nek stalojn. Li ne uzis ĉevalojn, sed kiam li vojaĝis, sur oraj flugiloj li leviĝis de la lazura grundo de la luno; li travojaĝis la spacojn, rapida kiel palpebrumo, aminda kiel feliĉon anoncanta meteoro.

Arimano ne havis precizan hejmon, sed nun ankaŭ li pasigis siajn tagojn en multaj el la plej belaj, plej pompaj arbaroj de la luno. Tiutempe ne ankoraŭ estis, kiel ni jam menciis, deklarita malamikeco inter li kaj Ormuzdo. Tute male, ili estis konatuloj, fojfoje renkontiĝis, kaj diris unu

al la alia "frato". Malblonda, altstatura aperaĵo, mallarĝaj sed karbonigraj brovoj, fajraj okuloj sub la frunto, ia melankolio ŝvebanta suber la buŝo. Arimano ofte, ja preskaŭ ĉiam, iris sola. Li ne konstruis domon; bienon aŭ grundon li ne sopiris; li ne estis mastrumanto, ordiganto aŭ zorgema provizanto. Tamen videblis jam en lia vizaĝo ke li havis tion, kiun oni nomas bona kapo. Pri liaj sentoj oni povis nenion konstati; sed tion oni vidis, ke li neniam ŝatis iĝi kolera aŭ fervora. Feliĉaj kaj malfeliĉaj okazintaĵoj, pri kiuj oni rakontis, vekis ĉe li neniun alian videblan emocion, ol diskretan rideton, kiu flugis kiel tuja krepusko super lia vizaĝo — kaj tiu malluma, rapida gesto estis ĉe li la sama, senkonsidere ĉu io iris bone aŭ malbone. Ĝuojn li ne serĉis propraparte; manĝon, trinkon kaj vestojn li uzis nur kiam li estis kun aliaj, kaj, kiel ŝajnis, ŝerce. Oni ne vidis lin pasie aliĝi al io, se ne al la plezuro iradi en silentaj boskoj elstare belaj, kaj restadi en kavoj ĉe la bordoj de la nemezureblaj lunmaroj. Ĉar li estis tio, kiun oni nomas supernatura estaĵo, ankaŭ li havis tiun kapablon, kiun homoj malhavas, sed al kiu ili donas la nomon "sorĉo". Tamen oni rimarkas ke li malofte uzis ĝin; same kiel li ĝenerale mem certe ne sciis pri la mirakla povo, kiun ĉiuj aliaj atribuis al li. Nur fojfoje li momente uzis sian kapablon. Estis, ekzemple, por rapidege krei al

si flugilhavan ĉaron de nigra silko, sur kiu li vojaĝis ien tra ĉielo kaj aero; aŭ por ĉirkaŭi sian frunton per rubando, per diademo de steloj, de la plej profunda kaj penetranta brilo — per kies vido li kutimis forigi de si altrudiĝemajn aŭ fervorajn feojn kaj personojn, kiuj maltrankviligis lin per troa babilado. Krom la fojoj, kiam li donis al si tiel forpuŝantan aspekton, li aliokaze vestis sin per la plej simpla kaj, se oni rajtas diri tiel pri tiu estaĵo, la plej modesta kostumo. Iam kelkaj feoj spite petis lin per sia sorĉbatono tuj krei same multajn riĉaĵojn kiel ili. Tiam li, ne per sorĉbatono, ĉar tian li neniam uzis, sed simple per tuŝo de sia piedo, transformis tutan montaron en kolekton de la plej eskvizitaj kaj riĉaj galanterioj. Kelkaj el la feoj, mirigitaj, volis tuŝi ilin, kiam ili per nevidebla bato, simila al elektra frapo, estis forpuŝitaj de tie, kaj devis iri for kun envio, malĝojo kaj nesatigita avido. Poste, tiu nekalkulebla riĉaĵaro nur kuŝis tie, nedezirata kaj malestimata de Arimano; ne tuŝata de iu ajn — ĝis fine du arbaraj nimfoj humile petis lin ke li lasu ilin ricevi kelkajn ornamaĵojn, kiuj utilis al neniu. Finfine li permesis al ili po unu ringon. Sed apenaŭ metintaj la ringojn surfingren, ili kun sovaĝa furiozeco eksturmis tra ĉiuj lokoj. Ili bruligis siajn proprajn plej amatajn ĝardenojn, ili atakis unu la alian, kaj ili ungis ĝis ili mortis

tiel multe kiel driadoj entute povas morti. Kiam Arimano ekaŭdis pri tio li diris nenion, sed ĵetis dum momento trankvilan rigardon malsupren al la granda, serena firmamento, kiu etendiĝis kiel nemezurebla volbo sub la luno.

Ormuzdo estis, je la tempo kiam komenciĝas nia rakonto, ege okupata. Oni vidis lin fervore iri tien kaj reen en sia salono. Li mezuris la plankon per grandaj paŝoj, kaj dum sia multflanka cerbumado li apenaŭ vidis sin mem. Li elpensis, kalkulis kaj decidis laŭ kiu plano la homaro sur la tero plej bone iĝu beata, kaj la naturo sur la tero ekfloru. Tiu plano devis kompreneble nun esti formulata, tuj post la kreo lanĉata kaj al ĉiuj disvastigata por esti de ili obeata.

Ĉar Ormuzdo estis severa al si mem, same kiel al aliaj, kiam temis pri devoj, kaj ĉar li cetere havis grandan iniciatemon kaj laborkapablon, lia tuta mondomplano estis elpensita post apenaŭ unu monato, kaj li ne prokrastis eĉ momenteton antaŭ ol prepari ĝian realigon. Li baldaŭ trovis, ke la plenumo kunportos multe da laboro pri detaloj, multe da skribado. Tial li instalas en sia salono nombron da belaj murŝrankoj kun multaj bretoj, kaj starigis pupitrojn sur la planko. Li dungis multnombrajn servistaron por sia kancelario; ĉar lian propran tempon sufiĉe plenigis la elpensado

de la apartaj temoj, ordonado kaj diktado. Ni estas certaj ke ĉiu, kiu aŭskultas nian prezenton, facile mem komprenos, ke la gradoj en la kancelaria servistaro de Ormuzdo ne povis esti tute identaj kun tiuj en nia tempo: kancelaria sekretario, protokola sekretario, registristo, kancelariano, kopiisto, unua pedelo, dua pedelo, ĉambrobalaistino kaj fajrogardisto. Tamen estas klare ke, ĉar ĉe lia buroo oni ellaboris la vivplanon de la tuta homaro, kaj poste publikigis ĝin por esti de ĉiuj obeata, do tial lia salono devis esti prabildo, ja modelo jam komence de la tempo ekzistanta, kaj surtere eble ne atingebla, por la egaj kaj etaj registemoj provitaj inter ni dum la jarcentoj. Ĉu ili estis io alia ol modeloj? Kaj ĉu ili povos iam iĝi io alia? Kvankam ni tial ja rimarkas, ke jam la eŭropaj terminoj kancelaria sekretario, kopiisto kaj fajrogardisto (el kiuj la du unuaj, kaj la lasta duono de la tria, havas romian devenon, sed la unua radiko en la tria termino ĝermanan) ne povus aperi ĉe Ormuzdo, tamen estis ĉe li dungitaj estaĵoj kun tute identaj postenoj, ĉar ni sub aliaj kondiĉoj ne povus kompreni ke liaj komisioj kaj celitaj aranĝoj povus moviĝi, kio tamen okazis. En Zend-Avesto (la fame konata libro de Zoroastro, en kiu estas priskribitaj kaj Ormuzdo kaj Arimano, la regado de la mondo kaj ĉiuj dualaj rilatoj) oni povas trovi videblajn

spurojn de tiuj postenoj. En la servistaro de Ormuzdo estas menciita jam komence *El-karam-duss*, kio en la Pra-persa signifas *iun, kiu flankenmetas sian tutan pensadon*; sed en la Mez-persa estas iaspeca *Apotekisto*, aŭ *iu, kiu kutimas produkti inkon*, eĉ pli precize *iu, kiu ĝuste uzadas inkon* (**Duss**: nigra suko, de la antikvuloj ĉirkaŭ Kaspia Maro uzita por malpurigi blankajn vestaĵojn). Ĉe la Malajoj troveblas pli-malpli la sama vorto, kaj signifas *iun, kiu staras surkape*. Ĉio tio kunigite verŝajne iĝas tio, kiun la eŭropanoj nomas *netskribisto*, aŭ en certaj idiomoj *kopiisto*, kaj eble oni nur modifu la *stari surkape* de la Malajoj al *kuŝi surventre*, aŭ kuŝi kun brusto kaj brakoj en pozicio de naĝanto premata al tablo. Zend-Avesto, en la ĉapitro pri la nemezureblo de la tempo (*Serwane-Akarene*), la majesta grandeco de la spaco (*Baifo*) kaj la neesprimebla pompo de la maro (*Dur-seran*), emfaze informas, ke Ormuzdo en sia ora salono havis ĉe si iun *Knip-nip*, vorto pri kiu Ankerilo diras ke ĝi ne estas persa. Ĝi fakte estas babilona; kaj ankoraŭ dum la tempo de Nebukadnecaro ĝi laŭdire signifis *morkelojn* en iu saŭco al fiŝo (laŭ aliaj: ŝafa viando; sed erare). En la Asiria troveblas *Knapuljepul* (evidente samsignifa kun *knip-nip* en la sekvantaro de Ormuzdo), kaj signifas *Kazean flanon*, aŭ specon de laktoprodukto

faritan per la kazeigilo de fastantaj bovidoj. *Nipi-knipo* estis ankaŭ skribite, kiel oni scias, super unu el la urbaj pordegoj en al Armena urbo Koi, kaj signifas *nepriskribeble lumanta* — epiteto de la trabantoj de Jupitero. El ĉio tio, kune kaj komparite, ni trovas, ke la estaĵo, kiun Zend-Avesto ĉi tie priskribas kiel nedisigebla disde Ormuzdo, estis *registristo* en lia kancelario — *lumanta* (kiel sekvanto de Ormuzdo, ja unu el liaj trabantoj) — kun vizaĝo *gravmiena*, signifoaspekta en sia kondutmaniero, kiel morkelo — *defendanto* de la aktoj de la salono, la tuta kolekto de dokumentoj, ofte metafore nomata "kazea flano". Ni konfesu, ke pri tiaj temoj ni eble miskomprenas multon; ni disponis nur la ekzempleron de Zoroastro, kiu venis unue al Parizo, tien donacita de Ŝaho Abbas al la same klera kiel plenmerite fama Sylvestre de Sacy. La disertacio pri la Ĉambrobalaistino — *Fattikaristan* — de Ormuzdo estas en tiu ekzemplero klare aliigita de malpli sperta kopiisto; ĉar, kvankam la plej multaj samopinias, ke *Fattikaristan* estas in-genra, kaj estas *ĉambrobalaistino*, ĝi tamen povas, se oni kredu akcentosignon tre diskrete metitan sur la unua *i*, iĝi vir-genra, kaj tiam estas *ĉambrobalaisto*. La lastan signifon multaj adoptis; sed ekzistas tria partio, kiu kun Scaliger

opinias, ke *Fattikaristan* estas ge-genra, samtempe vira kaj ina, vorto hermafrodita. Tio eble povas koincidi kun nia ideo pri ĉambrobalaado, sed ne esprimeblas en niaj eŭropaj lingvoj, kie nepre devas esti aŭ Ĉ-balaisto, aŭ Ĉ-balaistino. Tio estas afero malfacila kaj malĝojiga, plej bone kuracebla per nova ekzemplero el Persio. Klera Skoto (MacBurington en "Treatise on oriental Cattle. 1817"; t. e. disertacio pri orienta Brutaro: p. 193) opinias, ke oni pri Fattikaristan tute eraris, kaj ke ĉi tie eĉ ne temas pri ĉambrobalaado, des pli ĉar la antikvaj Persoj ne povis imagi, ke la ĉambro de Ormuzdo (la pura principo) estus balaenda. Li interpretas *Fatti* kiel *blovado*, ankaŭ *tuja efektivigo*, latine *Expeditio*. *Karistan* — kun *anacrŭs* (antaŭsilabo) *Se-karistan*, kaj en variaĵoj: *Sekraïstan*, *Sekrastian*, *Sekretisan*, *Sekreterisan*; estus unu el tiuj mirigaj pra-vortoj, troveblaj en ĉiuj konataj lingvoj, kaj pri kiuj oni tial ne scias al kiu lingvo oni prave atribuu ĝin. Svede *säck*, germane *Sack*, angle *sack*, france *sac*, latine *saccus*, greke *sakkos*, hebree *šak*, arabe *sakkon*, nialingve *sako* — ĉie la sama vorto, kaj la sama signifo. Tia konformeco ĉe ĉiuj popoloj estas neklarigebla. Ni niaflanke almenaŭ ne povas kompreni, kiel io tiel ĝenerala povus ekesti hazarde. Sako, manĝopakaĵo, kunvolvaĵo, kiun portas almozetanto, estas

simile nomata kaj indikata ĉe ĉiuj nacioj; malĝojiga, sed vera, averto ke ĉie estis kaj estas almozetantoj kun sakoj; malplenaj, sed laŭespere plenigotaj, kaj per certa kaŝita zorgemo havantaj la saman nomon en ĉiuj lingvoj, por ke la mizerulo sen interpretisto (kiun li ne havas monon por dungi) ĉie estu komprenata kaj helpata. Se ni tiel rigardas la persan vorton *Sekreterisan*, tiam ni havas la klarigon al la nialingva *sekretario*, franca *secrétaire*, latina *secretarius*, k. t. p. en ĉiuj kleraj lingvoj. Derivi tiun etimon, kiel oni faras, el *a secretis*, kun la latina signifo, estas sencie. Ĉar se oni komprenas "a secretis" tiel, ke estus *Secreti* (apartaj, specialaj personoj), tiam oni demandas kiel Sekretarioj povas estis nomataj apartaj, kiam ili svarmas ĉie, aŭ specialaj personoj, ĉar ili estas inter la malplej specialaj. Se oni interpretas "a secretis" kiel *secreta* (apartigataj, strangaj, sekretaj aferoj), kaj *Secretarius* kiel sekretechavanto; tiam tio estas eĉ malpli valida. Al kiu sekretario oni konfidas sekretojn? Aŭ kiu povus gardi tiajn, se ne la sekreton, kiel li vivas? Ĝuste tiurilate ĝia parenceco al Sako estas multe pli natura, krom la fakto ke ĝi havas bazon en profunda lingvostudado. La ekzisto de almozula kasto, disvastigita en tuta Eŭropo — la *Sekretarioj* — estas fakto same konstatita en la nova historio,

kiel tiu kiun la mezepoko donas al ni pri la *Ciganoj*. Post pluraj esploroj oni trovis, ke la laste menciitaj devenas el la bordoj de la rivero Sindo, kaj estis parto de la kasto de malriĉuloj en nordorienta Hindustano, de kie ili, dum iu skismo naskita en tiu lando, estis forpelitaj, kaj nun, disvastigitaj en la tuta okcidenta mondo, vekas ĝeneralan intereson per la miriga karaktero de sia sorto, sia mizero, siaj malvirtoj, la sekreto pri sia maniero vivteni sin, kaj strikta konservado de sia propra temperamento meze inter ĉiuj nacioj. Same forpelitaj estis la *Judoj* el Palestino. Sed tiuj ne konsistigas, kiel la *Cigana popolo*, almozulan kaston, sed male strebas manifesti ĝian malon. La *Sekretaria popolo*, kies kreskantaj kaj nombro kaj mizero ofte maltrankviligis la patrioton, tamen havas la apartaĵon, ke ĝi ne, kiel Judoj kaj Ciganoj, estis pelita el iu fora lando. Ĝia membraro tute male konsistas el infanoj de ĉiuj eŭropaj nacioj, kiuj, kvazaŭ pro blinda kaj neklarigebla furiozo, tirataj de timiga sorĉo, eniras tiun kaston kiel en ordenon, kies unua promeso estas malriĉo, kaj la dua provi per ĉiuj rimedoj prezenti tiel pompan vivmanieron, ke tiu kaŝas ĉiujn sekvojn de la unua promeso. Kvankam pluraj similecoj instigus la esploranton rekoni, en la Sekretaria popolo, modernan almozulordenon, intence planitan kiel ilon por la ĉimondaj registaroj nun,

same kiel la samnoma estis por la spirita regno de la Papo dum la mezepoko, tamen la ordena promeso pri la pompa vivmaniero, la promeso pri la eterne fanfaronantaj lipoj, kune kun palaj, velkintaj vangoj, malbone kaŝitaj larmoj en la okulanguloj tuj kiam la atmosfero iom malvarmiĝas, profunde entiritaj ventroj k. s., estas io, kiu precipe karakterizas la sekretariojn kaj apartigas ilin disde la mezepokaj *almozulmonaĥoj*. Tiuj faris sian eblon por montri al la mondo sian mizeron, dum ili inter si, sekrete, ofte vivis sufiĉe lukse; la Sekretarioj, aliflanke, uzas ĉiujn rimedojn por montri sin bonstataj al la mondo, sed kiam ĉiu el ili fine estas sola, li ne devas ion fari por ke lia mizero estu videbla. Sendube estas parto de la plano de la registaro, ke la ordenanoj tiel estu tute dependaj; por ke, kvankam kelkaj el la pli progresintaj inter la sekretarioj ĝuas relative bonajn salajrojn, tamen la promeso pri la fanfarona vivmaniero havas la efikon, ke tiuj ne sufiĉas, ne malhelpas la intencojn de la registaroj, ne levas la membrojn el la dependeco. La papo, por ke liaj monaĥoj estu dependaj de li, malpermesis al ili edziĝi; tiamaniere rezultis ke ili ne havis hejmon, ne havis posedaĵon, ne havis agnoskitajn infanojn, ne havis ĉiteran celon kiun ili povis ami, sed estis ĉiurilate subuloj de la papo. La niatempaj

registaroj tute ne malpermesas al siaj sekretarioj edziĝi; male ili komprenas, ke tiuj tra tiu paŝo iĝos eĉ pli ligitaj kaj dependaj, ĉar la nunaj virinoj iĝis iloj por la strebado de la registaroj kontribui al la ĝenerala subigado kaj subpremado de la nacioj. Tio okazis tiel, ke ili instigis la virinojn imiti la registarojn, kaj regi tra sekretaj komplikaĵoj. Sed la esplorado pri tio devigus nin transiri la limojn de nia temo, kiel ajn utile tio ja estus por la scienco. Tial ni nun forlasas la paralelon inter *la Almozulmonaĥoj* kaj *la Sekretarioj*; ni revenas al *la Ciganoj*. Kun ili, la Sekretarioj havas multajn komunajn punktojn. Tamen, la moderna raso diferencas de la Ciganoj tiel, ke la laste menciitaj estas ia en la kamparoj vaganta artistaĉaro, kiu preferas eviti la urbojn, sed parte distras, parte timigas la kamparanojn; dum aliflanke la unuaj estas skribistaĉaro, kiu plejofte fuĝas de la kamparoj kaj vagadas en la urboj, sed cetere malofte konas artojn, almenaŭ preskaŭ neniu el ili timigas, senkonsidere ĉu iu el ili kapablas distri. Oni multe disputis pri la origino de la vorto "Cigano": oni literumis ĝin foje *Zigueni*, *Zigeuni*, *Zingari*, *Sieni*, *Sigeni*, *Secheni*. Verŝajne tiu orienta vorto estas parenca ankaŭ al *Sig*, *Zich*, en Eŭropo nomata Sako, Sac. La Cigana kaj Sekretaria popoloj do havus la saman radikon por siaj nomoj, same kiel ili ĝenerale

havas la saman pakaj- aŭ sak-karakteron. Oni povas en universala senco diri, ke ili kune konsistigas *unu solan* almozulan rason, en kiu *la unuaj* (la Ciganoj) konsistigas la pli obskuran, fantazian, fean, sekretan, por poezio eblan flankon; dum *la lastaj* aliflanke estas la tute travidebla kaj hela, por poezio neuzebla, supraĵa, banala, plata kaj seninteresa flanko. Ciganoj plejofte havas nigrajn harojn kaj malhelan vizaĝkoloron; la Sekretarioj ne ĉiam helajn harojn, sed tamen klaran emon al paleco en la vizaĝa nuanco. La Ciganoj konservas eĉ ĝis sia maljuneco vivplenajn, brilantajn okulojn. La Sekretarioj, dum ili estas junaj, ofte montras fajron en la okuloj; sed kiam iliaj vivjaroj plimultiĝas, ilia mieno ĉiam pli platiĝas; ili havas grandan kapablon ĵeti malplenajn rigardojn. Ne estas seninterese pli ol ĝis nun esploradi ilian aspekton. Ekzemple ne estas tutcerte konstatite, ke ili ĉiam montras sin tre magraj. Kiam ili maljuniĝas kelkaj el ili iĝas korpulentaj, tamen preskaŭ ĉiam en malbela kaj sensignifa maniero; ne io kiun oni povus nomi organe bela abundeco, sed mekanika amasigo de porkaĵsimila, mola karno; pufigiteco, kiu diras nenion, kiu malhavas veran valoron, kaj al kiu foje mankas pure homa formo. Ni lasas nun tion, kaj multon pli, al la naturhistorio. Ankaŭ pri la anima vivo kaj pri la moralo prezentiĝas multaj

similecoj kaj malsimilecoj. La ciganoj havas malmultajn virtojn, kaj multe la malvirton ŝteli. La sekretarioj verŝajne havas pli da virtoj, kvankam oni ne konas ilin ĉiujn; tamen ili malofte ŝtelas dum sia juneco. Oni povas ĝenerale rimarki pri ili ambaŭ — kio estas afero sufiĉe unika — ke dum la Ciganoj per sia tuta formo cetere aspektas kiel io obskura, timiga, kaŝita; aliflanke ilia morala aspekto, iliaj mankoj, estas evidentaj (ili rabas meze de ŝoseo, kondutas porke sub la libera ĉielo, verŝajne miskondutas ankaŭ endome, sed sen zorgi se tio okazas en ĉeesto de pluraj homoj k. t. p.). La Sekretarioj, male, kiuj alikaze estas, je sia tuta karaktero, unu el la plej supraĵaj, helecaj, malprofundaj kaj malfermaj fenomenoj troveblaj, tamen grandparte kaŝas sian moralan aspekton, siajn mankojn, same kiel siajn virtojn; kiam ili faras ion malpermesitan, tio okazas en mallumo, almenaŭ ili tion provas. Estas treege malfacile decidi kun tuta certeco, inter la du popoloj, ĉe kiu el ili fakte troveblas pli alta morala valoro. Tamen ni inklinas al la Sekretarioj, kaj deziras ke oni ne tro severe prijuĝos ilin. Almenaŭ *unu* certa fakto estas favora al ili: nome ke, dum la civitanoj ĝenerale certe sen bedaŭro vidus la tutan Ciganaĉaron senescepte pendumita, aliflanke verŝajne neniu dezirus pendumi ĉiun Sekretarion. Ĉi tiu

deflankiĝo estis longa, sed ni tamen esperas, ke tiu, por kiu la zorgoplenaj aferoj de la homaro ne estas egalaj, kun empatio sekvis nin. Kiu amas la evoluon de la scienco kaj de la lingvistiko, tiu kapablos doni al nia prezento la lokon, kiun ĝi meritas. La ekzameno de la vorto *Fattikaristan* pelis nin en ĉi tiun direkton; tial ni nun revenas al la punkto, el kiu ni deiris, nome ĉe la penso de la Skoto MacBurington, ke tiu vorto en *Zend-Avesto* tute ne signifas *Ĉambrolaistino*, sed ke *fatti* estas *oficejo* kaj *karistan* *Sekretario*; ĉar ili ambaŭ kune konsistigas kancelarian funkcion, kiu ne estas balaado.

Ormuzdo jam ordigis sian tutan kancelarion, kiam Arimano iun vesperon venis al li. Kiam li estis mallonge klariginta al sia gasto siajn planojn, kaj dirinta kiel li planas efektiviĝi ĉion, Arimano respondis kun milda rigardo: "Sed ĉu do estas eble? ĉu vi vere estas serioza? Ĉion ĉi tion, per kiu mi kredis ke vi volas konversacie distri vian vizitanton, vi do fakte intencas efektiviĝi?"

Ormuzdo rigardis ĝin per okuloj, kiuj esprimis miron ke li povis entute pridubi tion.

Arimano plue diris: "Frato! tamen pripensu ĉu estas racie kaj juste, ke ni en la luno decidus, kiel la homoj vivu surtere? Ĉu ili ne rajtu formi kaj evoluigi sian socion tiel, kiel iliaj naturdotoj

aludas al ili?"

Amiko mia! Ormuzdo diris, via rimarko estas stranga. Ĉu vi do ne scias ke, se la homoj kaj la tero estas permesataj senmalhelpo esprimi siajn naturdotojn, tiam ili sekvos tiujn, kaj tiam ili pereos. Se io povu savi ilin de tio, se io povu gvidi ilin en pli bonan direkton, necesas ke tio okazu per povo kiu, sendepende de ili kaj ekster ili, kaptas kaj regas ilin.

"Ormuzdo!" la alia respondis, "se iu povo *ekster* vivanta estaĵo volas direkti kaj tiri ĝin en direkton, kien ĝi ne mem emas; tiam tiu povo, se malforta, tute fiaskos; sed se ĝi estas forta, ĝi sukcesos nur tiumaniere, ke ĝi frakosas kaj paralizos la vivantaĵon, kiun ĝi volas feliĉigi per sia bonintenco, sed stulta tiro."

Ormuzdo staris dum momento silenta, kun la buŝo pro miro duone malfermita. Mi, li diris finfine, mi estas la bono mem en la mondo. Mi *ja* gvidos teron kaj homaron al la bono; ili sekvos min kaj estos beataj, kiom ajn ili pro tio suferos.

Arimano respondis per rigardo, ankoraŭ inklina al milda mallumo: "Vi — se vi vere estas la bono mem en la mondo, do bonvolu iomete pripensi. Diru al mi, kial vi lokigis vian registaran oficejon en la luno? Se vi estus sufiĉe saĝa por vivi ene de la homaro mem, ene de la vivo kaj naturoj de la tero, por esti ĝoje kaj forte

parto de ĉiuj mil malsimilecoj de la estomaniero de tiuj malsupraj estaĵoj; tiam vi povus, ne per tia ekstera ordono aŭ elekstera tiro, sed per vekigita volo kaj pasio ene de tiuj estaĵoj mem, per sekreta interna idealo ĉe ili, instigi ilin kvazaŭ per propra volo serĉi tion kiu estas pli nobla, per propra nesondebla deziro strebi pligonigi sin, kion mi, same kiel vi, certe opinias ke ili bezonos. *Tiam*, ho Ormuzdo," Arimano pludiris, rapide turniĝante sur unu kalkano, kaj oni vidis sub liaj okuloj preskaŭ ion, kiun pentristoj nomus larmo — "tiam — vi ne konas min, vi ne scias kio mi estas, aŭ povas iĝi; sed egale — tiam vi estus granda, vi povus efektivigi ion nedireblan. Mi mem, mi kiu staras ĉi tie vidalvide al vi, povus brakumi viajn genuojn, sed —"

Ormuzdo, kiu pro siaj multaj taskoj neniam havis tempon aŭskulti ies respondon ĝisfine, ankaŭ nun ne aŭdis pli ol la unuan duonon de ĉi tiu, kaj poste staris pensante pri letero, kiun li intencis dikti al sia kancelaria sekretario. Li rimarkis nur la finan *sed* de sia gasto.

Sed — sed — sed — li ripetis duonlaŭte kaj grumbleme; neniam io krom obstinecoj, obstakloj, kontraŭdiroj kaj eternaj *sedoj*.

"Vi stulta malbenita klaŭno!" Ariman kriis kun voĉo subite alia, skuigante la tekton. "Tamen," li aldonis, "kial malŝparii vortojn aŭ

koleron pro tiu kompatindulo?" Li rehavis sian antaŭan, silentan manieron, kaj kelkajn fojojn transiris la plankon kun flankaj rigardoj al la pupitroj de la skribistoj. Fine li venis al sia gastiganto, kaj prenis lian manon kun mieno tiel neklarigebla, ke neniu povus diri, ĉu temas pri frida rideto, aŭ pri varma, senfina sincereco. Li diris: "Ormuzdo, mi foriras nun. Mi vidas ke vi havas multon por fari, kaj eble havos eĉ pli. Mi ne volas ĝeni vin, nek revenos ĉi tien estontece. Mi ne havas domon kaj hejmon kiel vi, des malpli kancelarion; mi estas nek ambicia nek laborema, malofte mi sekvas fiksjajn planojn. Malgraŭ tio, mi tamen plenumos ion, kaj kion mi mem ne faros, tion mi iam sendos mian Filon por efektiviĝi. Adiaŭ!"

Kiam li tion dirinte eliris, Ormuzdo turnis sin al sia Registristo kaj ordonis al li noti la elirinton en la nigra libro sub la rubriko *suspektinda persono*, kiel iun, kies konduton oni ekde nun vigle kontrolos.

Tiel komenciĝis tiu tutmonda kaj terura kverelo inter du estaĵoj, kiuj poste iĝis surtere konataj sub la nomo de la bona kaj malbona principoj; kvankam ni, niaparte, kuraĝas aserti nek, ke Ormuzdo estis tiel perfekte bona, nek Arimano tiel vere malbona, kiel oni devus povi postuli de ili, por ke ili taŭgu kiel principoj.

Tiel komenciĝis tamen la luktado, kiu poste

disvastigis tiel multajn malfacilaĵojn inter la homoj: luktado, tiel fama en la Oriento, kiu ankaŭ en Eŭropo, kvankam sub aliaj nomoj kaj formoj, iĝis tre grava por multaj. Sed antaŭ ol ni rigardos, kiel tiu batalo poste okazis, ni unue devas informiĝi kio estis elpensita en la salono de Ormuzdo.

Li gvidis kaj direktis siajn skribistojn tiel diligente, ke post mallonga tempo dek du dekretoj estis pretaj: 1:e Pri la hejma vivo de la homo: kiel li rilatu al edzino, infanoj, servistaro kaj dombestoj. — 2:e Pri Sanflegado: kiujn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn la homo konsumu, evitante ĉiujn aliajn; kaj kian sintenon dommastro havu kiam stomako de servisto ne bone funkcias. — 3:e Pri Ŝipirado: kiel estas devo de la homo, por sia progreso konstrui al si ŝipojn kaj boatojn; kiujn marojn kaj golfojn li travojaĝu, kiom da profito de komercado li havas devon havigi al si en certaj havenoj, kaj la sumo de la malgajno kiun li devas suferi en aliaj. — 4:e Pri la divido de la tero en Regnojn, Provincojn kaj Lingvojn. — 5:e Vojiradreglamento. — 6:e Pri instalado de Regantaj personoj kiam Ormuzdo mem ne havas okazon. — 7:e Pri Artoj: kiel virino havas devon, somertempe uzi striitajn, ankaŭ kvadratitajn ŝtofojn de certaj koloroj; kio estas preskribite, tute ne por esti al la homo ia devigo

kaj ĝeno (kio ne estas la intenco de iu ajn el la reguloj proklamataj de Omuzdo), sed tutsimple ĉar ili estas la plej belaj, la plej saĝaj, la plej bonaj, kaj do pro tio devus esti obeataj, devas esti obeataj, je puno de malbeno kaj damno estos obeataj. — 8:e Al la Tero kaj Naturo: kiamaniere la humo produktu kiajn specojn de plantoj por la vivtenado de la homo kaj de vivantaj bestoj. — 9:e Pri ĝardenoj: kiaj rozoj tie devas kreski (vidu modelon ĉi-kune), por pervide ĝojigi kaj perflare distri. — 10:e Pri la Kamelo kaj la Porko: kiom da idoj la kamelino kaj la porkino emu ĉiujare naski. — 11:e Pri fontoj kaj akvofluoj: en kiujn direktojn kaj al kiuj lagoj ili elverŝu sian akvon. — 12:e Pri Najtingaloj: en kiuj arbaroj ili ravige al homoj kaj aŭdantaj bestoj ekloĝu kaj muziku, je puno de pluvado kaj fulmotondrado.

La titoloj de tiuj dekretoj, kiujn Ormuzdo je la komenco de la tempoj publikigis por la prospero de la homaro (kvankam ni en nia tempo eble opinias, ke pluraj el tiuj reguloj povus esti kunigitaj, dum aliflanke mankas aliaj, eble pli urĝaj), estas listigitaj ĉe Khondemir en la XV:a libro de lia Mondhistorio. Nur la titolojn ni ankoraŭ havas, ĉar la dokumentoj mem malaperis, krom la 4:a, 5:a kaj 6:a dekretoj, kaj ĝuste pri tiuj aktoj ni komence parolis, kiam ni promesis mencii dokumenton

pri la geografio de Azio, kaj pri la problemo kiel solvi la bazan problemon de la Politiko. Tial ni nu ripetos ilin laŭvorte.

I. Reglamento pri la landdistribuo

Ni Ormuzdo, afable preninta sur Nin la taskon esti la bona principo de la Mondo, deziras al la novkreita tero kaj al ĝiaj loĝantoj sanon, pacon kaj bonfarton, kun ĉiuj pliaj karaj bonaĵoj kiujn Ni kapablas doni, ho amataj kaj bonaj amikoj! — Pro tio, ke al Ni estas informite, ke la post la kreo ŝaŭmantaj kaj baraktantaj elementoj nun tiel firmiĝis, ke seka tero, taŭga por piedirado kaj loĝado, grandkvante estiĝis, kaj ke ankaŭ homoj nun ekzistas tiel multnombraj kaj penskapablaj, ke Ni pro Nia favora dispozicio trovas ke estas nun la ĝusta tempo pripensi, kiumaniere kaj kiuorde tiuj daŭre vivu, por iĝi sperta kaj agrabla Homaro, same por ke la Tero estu bona Tero; pro tiuj kialoj Ni do en apartaj direktivoj kaj dekretoj pri la malsamaj temoj, kiuj vin koncernas, formulis kaj reguligis ĉion ĉi tion; certigante al Ni ke same vi, ho Homoj! kiel ankaŭ vi, ho Tero! obeos tiujn ordonojn ĉiurilate, por viaj propraj avantaĝo kaj daŭra ekzisto, kaj ke vi dumtempe mem sentos la konvinkon pri Ni kaj pri Niaj al vi donitaj ordonoj, kaj ankaŭ pri la aldonitaj punoj kaj

juraj sekvoj ĉiugradaj, ke Ni per ĉio ĉi tio tute Ni intencis, ke estu metita sur vi jugo, pezo aŭ devigo; sed estas ĉio plej profitodona al vi, sed ne al Ni.

Per la rajto de ĉi tio Ni proklamas al vi, kiameniere Ni trovis bone, ke la seka tero en la mondo estu de vi, ho Homoj! uzata por iri, restadi kaj loĝi, sed ke Ni ne permesas al vi loĝi en la akvo aŭ kuŝi en la aero. La tero estu dividita en plurajn regnojn, pro tio ke se vi, kiel Ni atendas, plimultiĝos, tiam ununura tia ne estos de Ni rigardata kiel deca por la tuta tero. Ankaŭ estos tasko via en ĉiu el tiuj ŝtatoj paroli malsaman lingvon, same kiel, en ĉiu aparta provinco de iu ŝtato, iom variigi la ĉefan lingvon de tiu ŝtato al tio, kiun Ni degnas nomi Dialektoj; kaj la unua kaj la dua por ke, same kiel la bela varieco de la rozoj surgrunde, la beleco en prononco, voĉo kaj vortoj eblu evolui en tiuj ŝanĝoj, sen kiuj ĝi ne okazos. Kaj nur tiel povas, laŭ Niaj planoj por la estonteco, naciaj temperamentoj, individuaj karakteroj, nacia poezio kaj klereco havi al si la eblon ekesti. En la regnoj vi konstruu urbojn al vi, precipe ĉe la riveroj kaj lagoj per kiuj Ni, en aparta dekreto al la Tero kaj Naturo, ordonis al tiuj ĝustatempe provizi sin. En tiuj urboj vi faru al vi protektejojn, tio estas Domojn; ĉar Ni ne povas permesi al vi la rajton, laŭ propraj eble

okazontaj kapricoj, tro multe frosti dumvintre, aŭ tro multe ŝviti dumsomere. Dum la printempo tamen estu al vi necese ne tro restadi endome, sed tiam vi iradu en boskoj kaj kampoj, por ke kompreno pri la belo ĉe vi vekigu.

Kio nun koncernas ĝuste kaj aparte la landdistribuon, tion Ni reguligis kaj tion reguligu tiu, kiu sekvos; estas vi trovontaj, je la fino de ĉi tiu dekreto, mapon, sur kiu estas devo via fiksi la rigardon, por ke vi komprenu tion, kiun Ni en la dekreto volas diri.

La tutan ĝis nun el la akvo aperintan kaj en taŭgan staton metitan sekan teron, tiun vi kun komuna nomo etikedu *Azio*.

Okcidente apud Azio vi vidas en la mapo relative grandan rondon, kaj estas devo via nomi ĝin *Nigra Maro*; iom dekstre de ĝi oblongan rondon, ĝi nomiĝu *Kaspio*, kaj ankoraŭ iom pli dekstre pli malgrandan formon, nomu tiun lagon *Aralo*! En tiu regiono unu el viaj popoloj ekloĝu; popolo rigardota kaj estimota kiel la esenco de la popolaro de tuta Azio, kaj tiukiale nepre nomota *Azoj*. Tiuj estas ordonataj konstrui en agrabla loko sian ĉefan rezidejon, *Azbienon*; kaj Ni aranĝos, ke eminentaj kaj famaj sortoj iom post iom estos ilia loto. Ili parolos la bazan lingvon de ĉiuj idiomoj en Azio, kaj tial tiu lingvo estu propradire nomata la azia aŭ la *aza lingvo*; kaj kiam ili, dum siaj okazontaĵoj,

migros al alia lando en la fora nordo, distingota per siaj klaraj ĉieloj dum la vintro kaj per siaj ĉarmaj pejzaĝoj dum la somero, tiam ili en tiu sia nova hejmo konservos sian Pra-lingvon, samtempe tiun de la tuta Tero, tamen eĉ pli evoluintan. Tiu lingvo enhavos la mirindan kvaliton kombini forton kun dolĉeco. La intenso, koncizeco kaj firmeco de la *severaj* vortoj de tiu lingvo ne estos kompareblaj al io ajn, se ne al la pureco, la nobla sono kaj la gracio de la *mildaj* vortoj de la sama lingvo.

Sude de la maro Aralo vi vidas ion, kiu nomiĝos la glora *Baktro* — Bakkra, Bokkra, Bokhara, Bukhara, kaj post iom da tempo Bukario. — Ni donas al vi ĉi tie plurajn nomojn, ne por ke vi uzu ilin ĉiujn samtempe, sed dum pasos la tempo unu el ili unue, la alian poste, kiam vi dum la jarcentoj eluzos ilin laŭvice kaj bezonos novan. Oraj ondoj de spikoj sur benitaj agroj karakterizos tiun landon, kaj la plej altkvalitaj teksejoj prilaboros fajnan lanon, por kiu venos vizitantoj de ĉiuj aliaj lokoj. Rapidu, konstruu al vi ĉefurbon en tiu lando, kaj nomu ĝin *Balho*. La rivero *Gihono* estas tiu, kiu en siaj speguloj akceptos la ridetantajn vizaĝojn de junuloj kaj knabinoj, kiuj irante en boatoj devos kanti himnojn por laŭdi tiun landon, kaj estos ilia devo ĝoji en Mavaralnaharo.

Okcidente de Baktro ĉe la suda marbordo de

Kaspio vi vidas *Masanderanon*, bonan kaj eminentan landon, kiu ne trompas la semanton. Ĉirkaŭe situas *Gilano* kaj norde *Turano*, kies infanoj preparu sin esti ĝismortaj malamikoj de la Persoj.

Sed sude de tie situos la lando amata de Ni kaj de la suno, *Irano*, kies vinbertrunkoj povos esti komparataj nur kun ties silkraŭpoj, kaj pli ol ĝiaj juvelŝtonoj brilos nur Niaj steloj sur la firmamento. En Irano la grundo ne povos rikolti la fajron, per kiu ĝi estas graveda, kaj kiun la tero ĉi tie, dankema al la suno, volas reoferi al li. Varme la fontoj odoros vintre, freŝige somere; kaj la majesto de la arboj devigos la admiroplenan spektanton heziti ĉu al ili li donu la antaŭrangon, ĉu al la lilioj, kiuj pri klareco kaj blanka brilo superas ĉion. Tie loĝos popolo, adorantoj de la suno kaj de la bono, Niaj amataj; kiuj nur malvolonte ruĝigos glavojn per homa sango, sed ĉefe luktos kontraŭ malicaj naturspiritoj, kaj nomos tiun venkon la plej granda, kiu konsistas en la plej bona malkovro en iu profesio por la kultivado de la lando, la feliĉa fluo de kanaloj kaj la plantado de arboj. Tie la paco, ne la milito, nomos la viron heroo pro plenumitaj grandfaroj super dezertoj kaj marĉejoj, transformitaj de li en pli celtaŭgajn kampojn; tie virto, ne honto, donos ruĝan koloron al la virino. Tamen tiu situacio en Irano

okazos ĉefe dum la regado de unu, pri kiu Ni volas aranĝi ke li naskiĝos kaj nomiĝos *Kajumarato*; ĝi daŭros ankaŭ sub *Huŝenko*; sed post tio devos okazi militaj eventoj kaj konflikto kun la Turananoj; pri kio Ni tamen ne informas vin en ĉi tiu, nur pri la landdistribuo temanta reglamento, sed volas Ni pli detale esprimi Nian opinion en alia proklamo, kie Ni instrukcios kiel la nacioj reciproke devos forpeli unu la alian, militi kaj translokiĝi, por periode gajigi la surfacon de la tero."

Nun, sinjoro Hugo, la dekreto plue listigos ĉiujn provincojn kaj urbojn, kiujn Persio devos havi. Estas tre bone scii tion, do vi, sinjoro Hugo, povos legi tion en ĉi tiu netskribaĵo, kiam ajn. Sed mi tamen ne opinias ke mi devas ĉimomente foruzi la tempon laŭtleĝante ĝin.

Poste la dekreto komencas paroli pri "mirinda lando, oriente de tuta la granda Irano (Persio)". Ĝia nomo estos *Ind-U-Schtân*. Sur la infanojn de tiu lando, la radioj de la suno falos malsame ol sur la infanojn de Irano, miajn amatajn. Tamen la Hinduaj popoloj ne pro tio estos malestimindaj. Ilia unua lingvo estos la *Samskreta*, kiu tamen devos iĝi pli profundensa ol belsona. Patrino ĝi iĝos de cent kvardek kvar idiomoj, kiuj devos esti la apartaj lingvoj en ĉiuj regnoj kaj lokoj de tiu lando. (Nun estas listigataj Popoloj, Provincoj, Urboj, Riveroj kaj

famon meritantaj Montoj, kiujn Induŝtano devos havi.)

"Sed" — estas poste skribite — "oriente de la lando de *Benareso (Bengalio)*, kaj oriente de la elfluo de la *Gang-ha-rivero* mem, la naŭkolora *Silkolando* (orienta Hindio, hejmo de la Seroj, Serika) havos siajn landlimojn, kie naninoj kudros al homoj kaj feoj mantelojn kaj trikos zonojn kun kaŝitaj fortoj. El la nordo kaj suden, tra la *Silkolando*, la rivero *Menankhomo* rulos sian blindigantan akvon. La partoj de tiu lando estos: 1) *A-ŝamo*, la malhelflava regno, tuj sude de la arbaro de Tibeto kaj oriente de Bengalio; ĝia urbo nomiĝos *Jergono*. 2) *Birmo*, la violkolora lando; estos forta kaj fajra popolo, kiel leopardoj; urbojn ili konstruos *Avha, Pegu, Ar-ragahn, Umra-pora*. 3) *Laoso*, sudoriente de Birmo, la ruĝa silkolando, la plej sekretoplena surtere; estos senurba, nur havos strangan vilaĝon, kies nomo estos *Lantŝano*. 4) *Tunkino*, oriente de Laoso (proksime al Ĉin), la blua silkolando; ĉefurbo *Ke-ŝo*. 5) *Kaocisino*, la bruna silkolando, konstruos nur malgrandan urbon *Ĉeboa*. 6) *Kamboŝo*, okcidente de Kaocisino, lando de la nigra silko, tra kiu la silenta rivero de la luno (*Menankhomo*) elfluis en la grandan maron. 7) *Ziamo*, la bela blanka silkolando, fama, granda kaj longe etendita, sude de Birmo. Ĝia urbo estos *Beankoko*. 8)

Malakho (Malajo), la duoninsulo de la oro*, la flava silko-provinco, sude de Ziamo, kun la agrabla urbo Malajo. En ĉi tiu lando loĝos la *malajoj*, kaj devos ili paroli *malaje*. 9) Ekster tiu duoninsulo situos *Ŝum-a-trah*, la verda insulo de la silko, ĉirkaŭata de la ondoj de la granda maro.

**Chersonneus aureus* vi, sinjoro Hugo, rekonas en ĉi tio.

Nordoriente de la naŭ silkolandoj (Serika) vi trovos Ĉin (Kitai, Sina, Ĉinio), la granda Orienta lando de Azio, la nemezurebla hejmo de la *blanka* magio." (Nun estas listigitaj ĉiuj provincoj de Ĉinio kun iliaj urboj, kaj fine estas dirite: "La popolo en tiu regno laboros diligente por prilabori argilon. Estas ilia sorto famiĝi tiamaniere. Nia volo estas, ke tiu de ili feliĉe traktota argilo en fora estonteco estu nomota porcelano, kaj — k. t. p.")

"Ekster Ĉin en la granda Nebulo-maro (orienta Oceano) situos memstara Insul-regno, *Ĝepon* (Japanio). Ĝi estas floranta pruno, falinta el la mano de fuĝanta diknabino, eterne naĝanta sur sovaĝaj ondoj; tamen, ne konvenas tiun rakonton mencii en Nia nuna dekreto. Ĝepon havos tridek ses golfojn kaj same multajn provincojn."

"Nun aŭdu! — plej norde en Nia tuta Azio,

norde de ĉiuj tiuj landoj, kies situoj estis ĉi supre fiksitaj, la ampleksan marbordujon *Samo** trovos tiuj, kiuj serĉos ĝin, kaj neniam forlasos ĝin tiuj, kiuj trovis ĝin; ĉar pri tiu lando estos onidiro, ke senhomaj regionoj, la hejmo de la *nigra* magio, konsistigas ĝiajn pejzaĝojn; sed, se nur unufoje tien veninta, oni fascinite kaj beate neniam plu foriros de tie. Inter *Samo* kaj Ĉin estos tiu rilato kaj tiu lukto, kiu estos kaj estu inter la *nigra* kaj *blanka magioj*, kies du regnoj ili prezentos, och kies popoloj ili nutros..."

*Vi, sinjoro Hugo, certe rekonos en ĉi tio *Suomion*, *Samojed-landon*, *Siberion*.

La fino de la plakato estas perdita.

II. Vojiradreglamento

Ni Ormuzdo, afable preninta sur Nin la taskon ktp ktp ktp. Kiam, ho homoj, vi konstruis al vi urbojn, kaj inter la domoj metis stratojn, trans kiuj iru ankaŭ transversaj stratoj; tiam estos via tasko ne ĉiam sidadi endome, sed devos vi vizitadi unu la alian kaj sociumi, kaj samtempe interrilati, uzante interparoladon, en kiu estu plejeble ofte inkluzivita priskribo de la mankoj de ĉiuj estaĵoj, kies malkaŝo estas eksterordinare grava. Sed kiam vi eliros al la stratoj, tiam ne

povos esti al vi permesite iri sur iuj ajn stratoj, ĉar tio povus perturbi la ĝeneralan ordon, se hazarde multaj el vi havus samtempe la ideon eniri la saman strateton, pro kio neniu povus tie pasi. Tamen, kaj por ke nenies libereco estu limigita, estas al ĉiu permesate unu fojon jare, je la tempo de la impostregistrado, deklari kiun straton li dum la venonta jaro deziras elekti al si, por per tiu iri al la vendoplaco, kaj per kiu alia iri al la haveno, per kiu tria al la apoteko; cetere li devas tiam listigi tiujn amikojn, kiujn li volas dum la jaro viziti, kune kun la strato per kiu li, por veni al ĉiu el la amikoj, volas iri; post kio Ni lasos laŭlegi la petskribojn al Ni, kaj laŭ Nia bontrovo decidus pri ĉies vojirado dum la jaro. Kaj estu la monsumo pagenda por tiuj decidoj uzota por salajri la kontrolistaron, nepre lokigotan en ĉiu stratangulo, por certigi, ke ĉiu urbano iru laŭ sia strato, kaj por devigi lin punpagi se li devios.

III. Proklamo pri regantinstalado

Ni Ormuzdo, afable preninta sur Nin la taskon ktp ktp ktp. Pro tio, ke Ni pro la granda nombro da juĝaferoj trovis, ke Ni mem kun Nia ĉi tie en la luno lokigita kancelario kaj ĝia dungitaro, kvankam tiu ja estas tre kompleta, tamen ne havas tempon entrepreni, decidi kaj efektiviĝi

ĉion, kio koncernas la teron kaj la homojn, Ni trovis bone tiel dekreti, kiel Ni dekretas:

1 §. Ĉiu Tera Regno havu unusolan viron (aŭ virinon) kiel Reganton super si en Niaj loko kaj funkcio; kaj kiu tial de vi, ho loĝantoj en ĉiu regno! estu rigardata kiel simila al Ni, kio devigas vin montri al li (aŭ al ŝi) la saman obeemon, fidelecon kaj devplenumadon, kiu apartenas nur al Ni mem.

2 §. Al ĉiu tia viro (aŭ virino) Ni donas kapablon el Ni, en sia lando ĝuste kaj bone regi; per kio vi sciu:

Mom. 1. Ke tuj, kiam viro (aŭ virino) en iu regno akiras la superregon, senkonsidere ĉu tio okazas per perforto aŭ per ruzo, aŭ kiel ajn povas al vi supraĵe ŝajni, tio estas la indiko, ke li (aŭ ŝi) ricevis de Ni potencon kaj aŭtoritaton esti via reganto en Niaj loko kaj funkcio, kaj ke Ni lin (aŭ ŝin) dotis kun la saĝeco kaj bona volo necesaj por la regado.

Mom. 2. Ke ĉiu ajn, kiu ne lin (aŭ ŝin) pri ĉio obeas, estas de Ni rigardata kvazaŭ li estus al Ni mem malobeema, kaj estas laŭ tio konsiderata.

Mom. 3. Sed se, dum iu sidas sur la trono (kp. §

4), alia persono en la regno sin levas kaj bruas: se li povas nenion efektiviĝi, tiam li estu rigardata kiel krimulo de la plej aĉa speco, kiel Arimana fripono; sed se li akiras la superregon kaj elseĝigas la unue menciitan, tiam estas via devo ovacii la venkinton kiel tiun, kiu anstataŭe ricevis de Ni la potencon regi super vi, kaj la eltronigiton vi poste devas nomi Arimana fripono kaj laŭe trakti.

3 §. Vi ne rajtas imagi al vi, ke iu via reganto povus, kiel via egalulo kaj kiel homo, fari eraron, esti stulta, aŭ maljusta. Ĉar kvankam li (aŭ ŝi) fakte povas esti ĉio tio, tamen li (aŭ ŝi) ja plenumas la potencon en Nia loko, pro kio Ni al li (aŭ al ŝi), per Nia sekreta mandato el la luno, sendas ĉiun tiun instruadon kaj saĝecon pri la ĝusta regado de la regno, kiu necesa estas. Kiel li (aŭ ŝi) cetere kondutas, estas egale; ĉar certe li (aŭ ŝi) estas en si mem same granda pekanto, kiel senescepte vi ĉiuj, ho homoj! Sed ĉar Ni, por ŝpari tempon, kiel Ni en la enkonduko al ĉi tiu proklamo diris, ne volas senpere mem regi viajn plej etajn aferojn, Ni do trovis bone, nur per unuopa interŝanĝo de diplomaciaj notoj kun la reganto, unu fojon por ĉiu tia, transsendi al li (aŭ al ŝi) el la luno la tutan komprenon kaj bonvolon, kiun li poste por sia tuta regperiodo bezonas. Tion vi trovas malpli ĝena por Ni. Kaj

Ni tamen ne evitus mem prizorgi vin ĉiurilate, pri kio pluraj el Niaj reglamentoj, laŭ Niaj esperoj, al vi tre bone atestas; se Ni nur havus tempon. Sed tempon Ni ne havas. Tial vi nun ricevas regantojn; aŭskultu ilin.

4 §. Via ĉefa kaj plej granda tasko, ho homoj! estos doni al la reganto el viaj havaĵoj kaj posedaĵoj ĉion eblan, kaj iom pli. Ĉar al la reganto estas devige ĝui eksterordinaran vivadon, por ke estu en vi gravurita ke li (aŭ ŝi) havas la potencon en Nia loko. Ne ĉar Ni mem tiel vivadus — tute male, Ni vivas sufiĉe modeste ĉi tie en la luno — sed estas al vi, ho homoj! ne eble kompreni kaj estimi grandecon, krom se ĝi estas ĉirkaŭata de la plej elstara, plej multekosta kaj plej malutila pompo (cetere de Ni mem profunde malestimata); do vi, por via propra bono, senvestigu vin, por per tia pompo ĉirkaui viajn regantojn. Vi tegu per oro lignon por tronoj, kurtenlitoj kaj baldakenoj; kaj adorante vi surgenuiĝu ĉe la sojloj de via regantoj; post kio vi ĉie en la lando provu malgrandskale vivi tiel, kaj viajn proprajn subulojn trakti tiel, kiel vi trovas ke viaj regantoj traktas vin kaj kondutas al vi. Per tio plifortiĝas ĉe vi ĉiuj ordo, sano, prudento kaj bonaj moroj; kaj vi iom post iom lernos esti miaj infanoj. Nun fartu bone; por plia konfirmo ktp ktp.

Ni nun citis la aŭtentikajn dokumentojn, kiuj senpere kaj senpartie montras ne nur la rilaton al pluraj disputataj detaloj en la geografio, moralo kaj lingvistiko, sed ankaŭ solvas la bazan problemon de la politiko, la *ĉiela delego* de la potenco. Vi, sinjoro Hugo, eble rimarkos, ke, laŭ ĉiu konata historio, la Vojiradreglamento tamen ne efektiviĝis. Tio estas vere — kaj plej mirige tiurilate estas la fakto, ke homoj en la urboj malgraŭ tio povis vivi sen perdiĝi kaj malfeliĉiĝi. Eble vi, sinjoro Hugo, el tio konkludas, ke se miloj da preskriboj, same gravaj kaj valoraj kiel la Vojiradreglamento, neniam ekzistus, tiam mankus multaj "ordoj", sed bona kaj necesa ordo eble tamen ekzistus. Sed ni revenas al Ormuzdo kaj Arimano.

Kio do fine rilatas al Ormuzdo kaj al la efikoj de liaj dekretoj sur la tero, pri tio oni rakontas la sekvontan. Kelkaj Derviŝoj kaj Mobedoj akceptis ilin ĉi tie malsupre kun granda entuziasmo, kaj faris ĉion por disvastigi ilin. La pli granda publiko kaj la naturo obeis, sed silentis. Ili ne estis ĝojaj. Ili estus pli ĝojaj, se oni atribuus al ili iom da bono; se oni permesus al ili propravole prezenti en hela loko kelkajn fruktojn de saĝo, forto kaj bono. Nun, kiam pri la prezentado de tiuj fruktoj estis ĉiam memorigate, minacate, postulate kaj esplorate,

tiam la fruktoj iĝis amaraj por la donantoj, kaj sengustaj por la ricevantoj.

Triste estis por Ormuzdo mem, ke li ankaŭ ne trovis la amplekson de la celata utilo tiel ampleksa kiel celite. Ne nur, ke lia vere bona intenco estis mistaksata, lia kora bonvolo misinterpretata — ili ankaŭ tro ofte malsukcesis. Tio instigis lin fari detaleman esploradon, kaj kion li trovis?

Li trovis, ke la floroj, bestoj kaj homoj, kiuj tage respekteme ricevadis la milojn da vojoj al feliĉo, beleco kaj prospero, kiujn li proponis al ili, ili nokte... Nokte ĉirkaŭpasis miriga Estaĵo en multoble varia formo super la tero. Sen plano, sen intenco, sen ordo ĝi venis, iris, agis, kaj sukcesis.

Kiam Ormuzdo, ekzemple, donacis al kelkaj blankaj florburĝonoj purpursukojn, kun la celo, kiun li zorgeme klarigis al ili, ke ili per tio havu sur siaj ekflorantaj blankaj folioj ruĝajn nuancojn, kiuj laŭ ĉiu kalkulado devos belege ornamati ilin; tiam kuris nokte, en la lumo de la steloj, iu estaĵo preter ili, rapida kiel fantomo, ne videblis la aperaĵo, nur dentoj kaj lipoj, en la formo de buŝo de ridanto. Pro tio la delikataj floroj tiel timiĝis, ke ilia plantofadenoj glaciigis, kaj la purpursuko donita de Ormuzdo ŝanĝis koloron kaj iĝis nigrablua; pluraj mincaj fibroj en la floro krevis, kaj la ŝanĝita suko disfluis

super la folioj en strioj sen ordo, nur tiel kiel la tuja timo devigis ĝin. Ne laŭ la direktivo de Ormuzdo — sed bela estis la rozo — en tiuj siaj novaj surprizaj strioj tiel noble bela — tiel (kun sia tuta timtremo) eterne kaj mirakle bela, ke la rigardanto ne povis sin satigi per la vido. Tiel okazis ankaŭ kun la bestoj kaj eĉ kun la homoj; foje en la hejmo de korpoj, foje en tiu de animoj. Ne ĉiam estis timo, kiu renversis tion, kion Ormuzdo la antaŭan tagon aranĝis. Foje io neklarigebla instigis ilin eĉ mem rideti, kiam la fantomo pasis ilin, kaj la interna beleco de ilia naturo subite disfluis en antaŭe nekonata ĉarmo. La ŝanĝon tamen ne ĉiam ni povus nomi feliĉa; multfoje la skuo estis tia, ke la delikatuloj krevis, kaj kuŝis velkintaj surtere. Ĉu fantomo povus tiel fascini? tiel vekti al beleco?

Ormuzdo maltrankvila — ĉar la mondo ja progresis, sed apenaŭ laŭ lia plano — Ormuzdo priesploris la nekonatan estaĵon, sed ne trovis lin. Tiu ne postlasis spuron, ne aplikis iun rimedon, ne mem iel agis. Sed la vera interno de la aĵoj vekigis tie, kie li preterkuris.

La sola afero kiun Ormuzdo povis fari, estis noti la nekonatulon en sia granda libro, sub la nomo "Suspektinda persono". Tie li ankoraŭ tiel troveblas.

.....

Ormuzdo — Ormuzdo mem iĝis en la tuta tero finfine nenio alia ol *suspektinda persono*. Aĥ...

Kiam la rakontanto, Richard Furumo, subite eksilentis, tiam sinjoro Hugo, Julianus kaj la aliaj ĉeestantoj rapide ekrigardis, surprizite.

Ili vidis la malheliĝantan frunton de la rakontanto ĉiam pli kliniĝi al lia mano. Longaj, malhelaj bukloj, lante falantaj, plejparte kaŝis liajn okulojn; sed io en ili videblis kvazaŭ brilanta de longtempe bridata, profunda melankolio.

Post momento li denove levis la kapon. Ne, li malrapide diris al si mem, tio certe ne temis pri Dio — eble tiu rakonto eĉ ne temis pri la vere persa Ormuzdo. Temis pri...

"Julianus, Henrik, Hugo, kial ni parolu pri io ajn? Ja kial?"

"Ho junulo, vi kiu sidas ĉe la tombo de la Bonvolo kaj legas la epitafon kiun ĉizis la ĉagreno — ne ridetu, ne vi ridetu al la orienta funebranta fikcio. Sciu, novnaskito, ke neniŭ semo estis sur la malvarmiĝanta tero semita, neniŭ tabulo al domo hakita, kiun ne faris la Bono — la Bono en pia, malestimata, ridinda formo. Ofte venas ŝi, la mizera, tiel simplanima, tiel senpripensa, kiel... tie ĉi. Ne havas malfacilaĵon la Mokrido, kaj la malestimanta Gracio streĉas siajn flugilojn tiel facile, por superŝvebi la simplulinon. Sed la Belo kaj la

Mokrido ne metadas dum silenta forgeso, kun nevenkebla kuraĝo, sableron apud sablero, ĝis loĝejoj kaj urboj, ĝis altaj muroj, ĝis mirakloj stariĝas, kiuj estas faroj de la Bono."

"Kiam la varma bonvolo havas sufiĉe da lumo, kiam la bono estas kronita per prudento same granda kaj nobla, kiel ĝia fervoro, tiam — mi scias tion — genuiĝos kaj vi, kaj la eta mokrido kaj la belo mem; kaj vi konfesos, tio estas la Majesto de la tero kaj de la ĉielo. Sed ankaŭ en pli aĉa vesto — en la plej aĉa — kliniĝanta en la polvon mem, la Bono estas, ho homo, via nekonata anĝelo, kiu sola kunigas, kie ĉiuj disipas; kiu sola konstruas, kie ĉiuj detruas. Gardu vin! Kaj gardu bone — gardu bone — gardu sufiĉe bone vian lastan, vian solan amikon...

(Aĥ, kaj tamen —

Kial stultas la bonul' —

Kial malicas la klerul' —

Kial ĉio ĉifonas —)